# HEJS

BULTENO DE

## HISPANA ESPERANTO ★ JUNULARA SEKCIO

**Nro. 31**

**Julio - Aŭgusto 1963**

**REDAKTORO: Sro. S. ARAGAY**

POŜTKESTO 26

Arce, 8, 2.º, 4.ª - CORNELLA (Barcelono) Hispanujo







FRONTPAĜA BILDO

Supre-S-ro F. Merayo raportas nome de la E-grupo de Villafranca de Oria, okaze de la laborkunsido de H.E.J.S. dum la 2-a Hispana Junulara Esperanto-Kongreso en Barcelono.

Malsupre .-D-ro M. Sancho Izquierdo, Prezidanto de H.E.F. alparolas al la junaj gekongresanoj.

-o-o-o-o-o-

## 2-a Hispana Junulara Esperanto-Kongreso

La plej brila junulara aranĝo ĝis nun organizita, estis la 2-a H.J.E-K. en Barcelono.En ĝi okazis :amuzajoj,laborkunsidoj,junulara oratora konkurso,k.t.p.,kiuj estis regaloj por la junaj gekongresanoj.

En aliaj paĝoj la leganto povos legi la plej interesajn raportojn kaj la duan premiitan oratorojon verkita de S-ro F. Merayo;ankaŭ la liston kiu enhavas la adresojn de la H.E.J.S.-estraro kaj ĉefaj H.E.J.S.-delegitoj en Hispanujo. La unua premiita oratorájo publikiĝos en la bulteno de la Federacio.

En la venonta numero ni publikigos Kontrakton subskribita de Germana Esperanto Junularo kaj H.E.J.S. kiun pro la longeco neeblas prezenti al vi nun.

La estraro dankas al ĉiuj partoprenintoj al la 2-a H.J.E-K., pro ilia helpo kaj kunlaboro.

Ĝis Valencio okaze de la 25-a Hispana Kongreso !

La Estraro

-o-o-o-o-o-o-

S-ro DANIEL CHEVALIER nome de Franca Fervojista Esperantista Asocio, invitas unu H.E.J.S-an(in) on partopreni Fervojistan Francan Kunvenon en Parizo,dum la monato decembro.Semajna restado kaj loĝadon senpagaj.Petu informojn al S-ro S. Aragay str. Arce 8-2-4 Cornella (Barcelono)

-o-o-o-o-o-o-o-o-

KORESPONDA FAKO.) Deziras korespondi.

17 jara studento en Liceo.S-ro Bernard Francoise 45 rue des Chalets. LE MANS. SARTHE. Francujo.

Esperanto Asocio de Brasilia. Av.W-3 Quadro 6 Lotes 12/14 Brasilia. Brazilo.

Dudek gekursanoj diversaĝaj kaj diversprofesiaj.Skribu al la instruanto.Inĝ. arn.Petar Nikolovski. Dj.Djakoviĉa 5 Kumanovo. Jugoslavio. Petu informojn rekte al S-ro F. Parareda str. San Pedro 23. Moyá (Barcelono)

-o-o-o-o-o-o-o-

STUDENTA FAKO komencas sian funkcion ekde nun.Studentoj: skribu rekte al ĝi indikante vian karieron,altlernejajn studojn ktp.Samtempe klarigu se vi estas preta kunlabori en granda kultura studenta kampanjo.

-o-o-o-o-o-o-o-

## JUNULARA ORATORA KONKURSO

DUA PREMIO S-ro F. Merayo

### "KIEL LA MOVADO ESPERANTISTA POVAS HELPI LA HEJMAN PACON"

Mia simpla kaj humila parolado pritraktos rezumon praktikan rilate al la ebla favora rezulto por la hejma paco pere de la lernado de Esperanto.

Okazis ie,ke antaŭ unu jaro oni deziris enkonduki Esperanton, sed kaŭze de tio ke la enloĝantoj parolas regionan lingvon tio ne estis ebla. Oni penis multe por konvinki ilin ke por - efika agado tra la multaj sekcioj de la industrio,komerco, - scienco,k.t.p. regiona lingvo ne sufiĉas, oni devas uzi anglan, francan,germanan,inter aliaj,kiuj reprezentas longan kaj malfacilan lernadon.

Ĉar multaj homoj deziras uzi krom la propran lingvon, almenaŭ aliajn idiomojn,oni devas komprenigi ilin ke nur Esperanto solvos tiun problemon,ĉar la menciita idiomo jam estas uzata de la tuta mondo.

Kiam ili finfine akceptas organizi kurseton de Esperanto,el kiu partoprenas multe da personoj oni devas aldoni ke dank'al Esperanto ili pli bone, konos la propran lingvon.

La plej granda parto de la enloĝantoj en ĉi tiu regiono, kutimas post la laboro ĉiutaga,kunveni ĝis la noktomanĝo en la vintrinkejoj parolante amike.Tio ĉi estas simpatia kaj gaja - afero,sed la rezultatoj estas sincere malfavoraj sane kaj spirite.Se oni multe trinkas la kapo ne funkcias bone;plie por la hejma ŝparo tio estas grava perdo. Ankaŭ ili ne multe okupis sin pri la edukado de la familio kaj observi pli diligente - ĝiajn problemojn.

Resume: la hejma feliĉo tre riskas dum la restado en la trinkejo.

Nune,personoj de ĉiuj kapablecoj kaj aĝoj ĉeestas lernante Esperanton en la menciitan lokon. Ili devas lerni la lecionojn en iliaj hejmoj,kaj ankaŭ ĉeesti la kurson.

Ĉar ili pli longe restas ĉe la familio,ili povas konsili al la filoj per la ekzemplo,restante hejme: la fraŭloj perfektigas ilian propran kulturon kaj plie ŝparas monon: en la familio la edzino laboras pli kontenta hejme,ĉar havas apud ŝi pli da tempo la edzon, aŭ la filojn.

Eĉ ankaŭ la lernantoj povas fanfaroni antaŭ la plej lertaj - najbaroj pri tio ke ili facile korespondas kun diversaj landoj, per unu sola lingvo.

Jen unu plian kaŭzon por enkonduki la lingvon Esperanton, tra popoloj, regionoj kaj vilaĝoj, precipe organizante kursojn se eble ŝtataj ĉar tiamaniere oni kontribuas al la homara -paco. Unue, por la plej bona kulturo. Due, pro la rimarkinda -ŝparo. Kaj fine tiel perfektiĝas la rilatoj inter la popoloj eĉ regionoj de la sama lando, komprenante unu la alian, almenaŭ lingve, forta bazo por pacigi la mondon kiu estas : Unu Granda Ronda Familio.

-o-o-o-o-o-o-o

## SALUTOJ EL ĈINIO

### al la 2-a Hispana Junulara Esperanto-Kongreso

### okazinta la 25-an ĝis la 28-an de aŭg. de 1963

### en Barcelono

Tre karaj hispanaj junaj geamikoj.

El malproksima Oriento, el Ĉinio mi sendas al vi ĉiuj miajn plej korajn gratulojn kaj amikajn plej sincerajn bondezirojn okaze de la 2-a Hispana Junulara Esperanto -Kongreso en Barcelono.

Dank'al mia kara amiko, Prezidanto de H.E.J.S, s-ro S. Aragay mi estas bonege informita pri la junulara -E-movado en via lando. Kun ĝojo mi vidas, ke la intereso por nia kara lingvo Esperanto pli kaj pli kreskas inter la hispana junularo. Mi tutkore esperas, ke vi varbos pli da gejunuloj al nia kara lingvo en 1963, la " Jaro de la Esperantista Junularo".

Fine mi deziras al vi ĉiuj, precipe al Prezidanto kaj la estraro de H.E.J.S. multajn sukcesojn en la poresperanta laboro.

Feliĉan libertempon, sanon kaj ĝojon al vi sincere deziras.

Via juna ĉina amiko.

Armand Su

-o-o-o-o-o-o-

Dezirante la H.E.J.S.-estraro dediĉi siajn energiojn speciale al siaj respektivaj taskoj, oni aprobis dum la pasinta estrara kunveno en Sabadell, starigi SEKRETARIEJON -POR LA KATALUÑA DELEGACIO DE H.E.J.S. Tiel do ekde nun katalunoj skribu rekte al la menciita sekretariejo por solvi kaj trakti ĉiujn viajn aferojn.

-o-o-o-o-o-

RAPORTO DE "EKKURSA FAKO S-ro C. Bello

Karaj geamikoj: Kiel kunlaboranto de H.E.J.S. kaj helpanto de la delegito de "Ekskursa Fako" mi plezure profitas ĉi tiun kongreson por prezenti al vi kelkajn interesajn aferojn rilate al tiu ĉi Fako.

Eble inter la fakaj kadroj de H.E.J.S., sendube "mi opinias" Ekskursa Fako estas la malpli rimarkita, tamen laŭ mia vidpunkto oni devas konsideri ĝin kiel unu el la plej grava, ĉar studante ĝin atente oni tuj rimarkas sian influonsur la esperanta movado.

La rolo plenumita de "Ekskursa Fako" estas komparebla al tiu de "Koresponda Fako", kompreneble tiu ĉi estas pli ampleksa ĉar ĝi atingas grandan trafdistancon, dum Ekskursa Fako agas pli hejme, pli familie, pli rekte; ĝi akcelas la pliproksimigon de la samideanaro igante ilin rekte interrilatiĝi.

AKTIVECOJ.) Dank'al nia fako, iom post iom oni konstatas pli da aktiveco en H.E.J.S. ol en aliaj pasintaj jaroj. Tamen ankoraŭ oni povas diri ke ni ĵus troviĝas je la komenco.

Ke ni povas atingi plimulton per iu bona organizita fako tion pruvas tiun ĉi statistikon pri la aktiveco de H.E.J.S. kies skizon pri ĝia historio de kvin jara ekzistado kaj proksimume du jara funkciado de Ekskursa Fako mi tuj sekve prezentos al vi.

FONDIĈO.) Estis la jaro 1959 kiam okazis la unua ekskurso en la historio de H.E.J.S. tamen pro manko de Fako, ili ne estis registrita. Aliaj ekskursoj okazis dum la sekvanta jaro 1960 ankaŭ ne kontrolitaj pro la sama motivo.

Pli ol 10 ekskursoj okazis dum la jaro 1961; la aktiveco kreskis tiagrade ke oni decidis krei specialán fakon inter la jam ceteraj ekzistantaj. Tiel do, la jaron 1962 kaj dum la H.J. Renkontiĝo en Sabadell oni fondis Ekskursan Fakon. Por zorgi ĝin, oni nomis delegiton al s-ro Albert Mimó el Sabadell kaj la subskribinto kiel helpanto.

Samjare, sub tiu fako, kaj jam kiel eble plej bone organizita oni kontrolis 8 sukcesplenan ekskurson. Bedaŭrinde pro la naturelementoj nia regiono estis trafita de katastrofo, malebligante plurajn planitajn ekskursojn eĉ kunvenon. Sed antaŭ ĉion, mi devas rimarkigi ke dank'al nia fako ofte kunestadis gesamideanoj el pluraj urboj.

NUNA STATO KAJ GRAVECO DE LA ROLO EKSKURSA FAKO

Certe la laboro efektivigita de tiu fako ankoraŭ ne estas finita, kiel mi diris antaŭe ĝuste ĝin troviĝas je la komenco. Tial do, mi proponas al ĉiu esperantisto por ke ili strebu por pliampleksigi sian poresperamtan aktivecon.

Ni devus promesi al ni ke ni faros ĉiam niam eblon por atingi ĝian tutan plenumecon.

INTERKONATIĜO KAJ PRAKTIKA UZADO.- Tion dirite ke neniu aldonu: "Tiu fako ne interesas min",ĉar ĝi estus erara. La ekskursa Fako krom la plezuro interkonatiĝi kun novaj gesamideanoj,novaj amikoj,ĝi nepre estos taŭga rimedo por pli -perfektiĝi kaj plifaciligi la parolon; samtempe tiu kunestado certe instigos nin konservi viglan kaj vivan intereson -por la internacia lingvo kaj tial resti ĉiam esperantisto.

NECESO DE KUNLABORO KAJ HELPO DE ĈIUJ SOCIETOJ .- Estas morala devo de ĉiu klubo,ĉiu samideano,daŭre kaj persisteme instigi la iniciativojn de la junularo precipe por ekskursado.

Ĉiu klubo devus organizi de tempo al tempo iu ajn ekskurson;oni devas aranĝi ilin diversloke,tra la montoj, al iu ajn urbo. Kiu urbo ne posedas iu ajn mirindajon por montri al siaj gastoj? Eĉ kvankam nur estos por komunaj amikecaj kontaktoj, jam sufiĉus por ke ni atingos la plej grandan sukceson kaj -plie la plenan disvastigon de la Lingvo Internacia.

Pere de nia fako estas necese ke ĉiu Esperantorganizajo kaj ĉiu esperantisto kunlaboru diversgrade en la planitaj programoj,kaj ke ili multe kontribuu al la sukceso.

Rememoru:agado ĉiam elvokas agadon,same kiel malagado nepre,kaŭzas regreson.

Bedaŭrinde en kelkaj urboj la agado de Ekskursa Fako estas tre relativa; en aliaj ĝi ne estas, tamen la laboro estas vere gravega.

Ĉiu el ni devus scii ke por atingi percepteblan rezulton necesas grandan celkonscion kaj daŭran kaj senliman sinoferon. Rememoru ankaŭ ke per iom da bona volo estas eble eĉ duobligi la agadon de nia sekcio.

Kaj finfine mi petas:ni klopodu per ĉiuj niaj fortoj por plialtigi la efikon de nian agadon,kaj ĝin ampleksigi strebante al nia movado, pli da novaj kunlaborantoj kaj ĉiam instigi ilin partopreni al nia movado.

Neniam forgesu: ju pli da kunlaboro kaj pli da sugestoj nepre, des pli da rimedoj kaj konsekvence pli da sukceso !

-o-o-o-o-o-o-o-

FILATELIA FAKO. jam ricevis pli ol 3000 uzitajn poŝtmarkojn dum la kuranta jaro 1963,kiujn ni sendas al U.E.A.

Se vi ĉiuj helpas, sendante al ni pliajn,eble oni atingos 5000 uzitajn poŝtmarkojn kaj tiamaniere U.E.A. premiios H.E.J.S. kun valoran libron. Helpu nin.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

ANTAUPAROLO DE D. Wranka

"IMPERATIVOJ DE LA VIVO"

Per la aporo de tiu ĉi libro en la esperanta traduko prezentiĝas al ni esperantistoj la malofta okazo konatiĝi kun eminenta brazila verkisto sur la kampo de la universala filozofio. Lia nomo estas prof. HUBERTO ROHDEN, Verkaro lia, kiu estas - tutmonde konata kaj parte jam tradukita en ĉiujn kulturlingvojn estas amplaksa.Ĝi konsistas el kvardeko da libroj.La tutan krean laboron de tiu eksterordinare fekunda filozofo oni povas dividi en verkoj:1-e Pri Filozofio;2-e Pri Evangelioj;3-e Pri Filozofio de la Vivo;4-e Popolsciencaj verkoj pri la mistero de la Naturo, kaj 5-e Biografioj pri tutmonde konataj personoj.Li estas brazilano,naskiĝis en la suda ŝtato "Santa Catarina". Studis en "Sao Leopoldo" (Rio Grande do Sul), poste en Eŭropo, kie li diplomiĝis pri Filozofio kaj Scienco.

Nelonge post tio li ricevas la katedron kaj profesoras en la "American University" en Vaŝintono, prelegante tie dum kvin - jaroj Filozofion kaj Komparajn Religiojn. En tia medio li trovis la ĝustan terenon por sia plua evoluo kaj posta kariero. De tie datas lia vigla kontakto kun la sciencaj rondoj kaj la amikiĝo kun la fama fizikisto A. Einstein.

Nuntempe prof. Huberto Rohden prelegas Filozofion en Brazilo en la urboj: Sao Paulo, Rio de Janeiro kaj aliaj. Li reprezentas la klazikan filozofion.La universala filozofio trovis en li ne nur spirite alte evoluitan personecon, sed ankaŭ, danke al lia klereco,objetivan esploranton de la transcenda mondo. Kio lin pleje karakterizas kaj daŭre fadenas tra lia verkaro estas: granda amo por la Homo kaj la Vero. Apenaŭ unu verkisto de tiu filozofia skolo sukcesis tiel plastike prezenti al la homaro la faktojn de la spirita mondo kaj la Universalan Kriston. Tion kapablas nur tiu, kiu en si men unuigas kvazaŭ la tutan Universon. En mallongaj ĉapitroj,en aforisma stilo kristalklara konprenebla ankaŭ al neklera,li analizas komplikajn problemojn de la materia kaj spirita mondo. Klarigas la neklarigeblan,diagnozas kaj rekomendas la purigan medikamenton: "Ekkonu vin mem." Mistiko en pura vesto.libera de fanatika religiemo, sen sektemo aŭ dogmeno. La Vero tiel prezentita ne povis resti seneĥa. Grandnombra estas la legantaro,kiu lin sekvas. De la suda Brazilo ĝis la nordo. Al la homo laca,droninta en la materialismo ĉiutaga,li montras novan vojon al la Vero.Tiu ĉi traduko estas la nuna paŝo por konatiĝi la verkojn de prof.Huberto Rohden ankaŭ al nia Esperanta rondo familia.

-o-o-o-o-o-o-

ESTRARO DE H.E.J.S.

Laŭ tradicio,ĉiu estrarano,aldone al ĝenerala respondeco havas sian apartan taskon.Zorge dividinde la laboron,oni -certigis bonan plenumon de ĉiuj taskoj.

LA ESTRARANOJ(kaj iliaj apartaj taskoj) estas:-

PREZIDANTO-S-ro S. Aragay (Redakcio,Kongresoj kaj eksterlandaj rilatoj) str. Arce 8-2-4. Cornella - (Barcelono)

VICPREZIDANTO-S-ro A, Tomasa (Kampanjo NEO) Carretera de Sampedor 68 Manresa (Barcelono)

SEKRETARIO- S-ro F. Parareda (Koresponda Servo) str. San Pedro 23 Moyá (Barcelono)

VICSEKRETARIO- S-ro J. Gomá ( Gravurájoj) str.Olcinellas 108 - 1 Barcelono 14

KASISTO - S-ro R. Jovani str. Pasaje Pujós 17-19, Hospitalet (Barcelono)

EKSPEDADO DE LA BULTENOJ - S-ro C. Bello str. Coso 39-3 Manresa (Barcelono)

INFORMA FAKO-S-ino Mª Teresa Magriá str. Pasaje Alió - 24-3-2 Barcelono 9

STUDENTA FAKO- S-ro Carlos Sainz str. Gartambide 57-3-D Madrid.

FILATELIA FAKO- S-ino Amparo Garcia str. San Ramón - 25-4-1 Barcelono 1

EKSKURSA FAKO- Ĉiuj estraranoj.

SEKRETARIEJO DE LA KATALUNA DELEGACIO DE H.E.J.S.
S-ino. Magencia Garcia. str. San Ramón
25-4-1 Barcelono 1

H.E.J.S.- Delegitoj

S-ro Gonzalo Herrero.str. Montesa 19-3-izda. Madrid 6
" Juan Azcuenaga. Str. Bonifaz 13-1. Santander
" F. Merayo. Hotel Martínez. Villafranca de Oria (Güip.)
" J. Ostariz. Trabesía B. Uribarri 18 bis. Bilbao
" R. Senís. str. Claustro 2-1. Tarragona
" J. Cardellac str. Conde Salvatierra 99 Tarrasa
" A. Mimó. str. Alcalde Comas 15 Sabadell
" A. Castellón. str. Tintes 6 Valladolid
" A. Farrés str. General Mola 27 . Artés (Barcelono)
" J. Talamás. str. Sevilla 3. Premiá de Mar.
" W. Vidal str. Escalante 158, Cabañal (Valencia)
" A. Talens. Calvo Sotelo 47. Burjasot (Valencia)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

RAPORTO DE " INFORMA FAKO " F-ino Mª Teresa Magriá

Post unu jaro kiel delegitino de Informa Fako, mi ne povas diri, bedaŭrinde, ke mi realigis grandan laboron.

Tutsimple, mi limiĝis ek de la komenco solvi internajn rilatojn de nia movado, kaj de la movado de niaj regionaj grupoj.

Ankaŭ mi helpis diskonigi trimonate, la novájojn kiujn mi ricevis pri Esperanto; eldonante informilon kaj sendante ĝin al ĉiuj hispanaj radiostacioj kaj ĵurnaloj, tia laboro mi plenumas por helpi al la Informoficejo de la Hispana Esperanto Federacio. Mi mencias ke ĝis nun multaj de la informoj senditaj de mi aperis en la plej gravaj kaj altnivelaj ĵurnaloj kaj revuoj de Hispanujo ekzemple : A.B.C. , Vanguardia, Sur. ktp. Same multaj - radiostacioj dissendas niajn informojn.

Pro tio mi petas el ĉiuj H.E.J.S.- delegitoj kaj Esperantaj grupoj, bonvolu nepre sendi al la Informa Fako ĉiujn novaĵojn de nia Esperanta movado, tio estas: pri novaj E-kursoj, Ekspozicioj, Ekskursoj, Prelegoj, konferencoj, ktp. rekte al mia privata adreso :

H.E.J.S.- Informa Fako F-ino Mª Teresa Magría
str. Alió 24-3-2 Barcelono (9)

-o-o-o-o-o-o-o-o-

NOTAS DE SECRETARIA

Nuevos socios.- Srta. Ingrid Carlson y S- rs. José Mª Serrano Salvador Martínez, Juan Ostariz, Roger Mimó, Luis Mª Hernández. Sergio Forcadell y E.-Kurso Villafranca de Oria.

Socios que han efectuado el pago de la cotización anual

Srtas. Mª Teresa Magriá, Matilde Magriá, Magdalena Falcó, Francisca Yruegas, Diana Puig y los Sres. R. Alberich, José Pérez de Bustos, José Pech, Mariano Leonat, Luis Mª Hernández, Mateu Francisco, José Cardellach, Salvador Llorens, Roger Mimó, Albert Mimó, Hector Puig, Juan Ostariz, Salvador Martínez, Jose Mª Serrano, Sergio Forcadell y E-kurso Villafranca de Oria.

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

Se ruega, abonen la cotización del corriente año lo más pronto posible, los miembros que todavía no lo hayan hecho y enviado el importe correspondiente al Sr. Cajero R. Jovani. Pasaje Pujós 17-19. Hospitalet (Barcelona)

-o-o-o-o-o-o-o-o-o-

# MADERAS CALLAU

**Sans, 302 - Teléf. 239 05 24**
**BARCELONA (14)**

# jovani

instalación
restauración
reparación

juegos electrónicos, futbolines, billares, billarines, etc.

instalación sin ningún gasto para el cliente

**PJE. PUJÓS, 19 - TEL. 205 11 83**
**HOSPITALET - BARCELONA**

# ZURCIDORA
*y*
# TEJEDORA
## ROSITA GALBANY

Sans, 292, bajos
Tel. 230 29 41
BARCELONA

# ELDONEJO KOKO

Randbølvej 4
Kopenhago - F
DANLANDO

"La Marvirineto"
*27 x 21 cm. bindita*
*75 paĝoj. Prezo: 30 steloj*